

N. N. 73,
Die Frau ohne Beruf

Ein Gedicht zum Muttertag

Ohne Beruf. So stand es im Pass!
Mir wurden fast die Augen nass!
Ohne Beruf war da zu lesen,
Und sie war doch das nützlichste Wesen.
Nur für die andern zu sinnen und sorgen
War ihr Beruf vom frühen Morgen
Bis in die tiefe, arge Nacht
Nur für der ihren Wohl bedacht.
Gattin, Mutter, Hausfrau zu sein,
Schließt das nicht alle Berufe ein?
Als Köchin von allen Lieblingsspeisen,
Als Packer, wenn es geht auf Reisen.
Als Chirurg, wenn ein Dorn sich im Finger eintritt,
Schiedsmann bei Kämpfen, erbost und erbittert.
Färben von alten Mänteln, Röcken,
Finanzgenie, wenn man das Geld soll strecken.
Als Lexikon, das sicher alles soll wissen,
Als Flickfrau, wenn Strümpfe und Wäsche zerrissen.
Als Märchenerzählerin ohne Ermüden,
Als Pupp doktor, als Dekorateur.
Als Gärtner, Konditor, als Friseur.
Unzählige Titel könnt ich noch sagen,
Doch soll sich der Drucker nicht länger plagen,
Von Frauen, die Gott zum Segen erschuf.
Und das nennt die Welt dann "Ohne Beruf."

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas N. N. 73.

Arg-939-1887 (2013-11-28 15:13:27)

Tiu ĉi poemo troviĝas en http://www.christenload.com/christliche_gedichte/muttertag/die-frau-ohne-beruf-587.html kaj en <http://www.steinhude-am-meer.de/f5-dit/?domain=www.steinhude-am-meer.de&show=detail&artikel=6990>.

N. N. 73,
La virino sen profesio

tradukita de Joachim Gießner

"Sen iu profesio", eldiras la pasporto.
Ĉu povas esti vere? Al mi ja mankas vorto.
Kaj fakte jen mi legas: "Sen iu profesio.
"Sed male, evidente utilas ŝi por ĉio.
Cerbumi nur kaj zorgi, labori por aliaj
ja estas profesio. Per pensoj, manoj siaj
matene ŝi komencas ĝis longe en la nokto,
por l'bono de la siaj. Ŝin ne kontrolas vokto.
Edzin', patrin', mastrino en familia domo
inkludas profesiojn sennombrajn de la homo.
Ŝi klare kompetentas tagtage por manĝaĵoj.
Pakisto ŝi fariĝas por famili-vojaĝoj.
Kirurgo, se en fingro pikiĝas dorn-doloro,
juĝisto en kvereloj kaj pro amara ploro.
Ŝi novtinkturas robojn, mantelojn eluzitajn,
genie ŝi financas monujojn tro streĉitajn.
Vivanta leksikono por ĉio en la mondo
kaj flikas la tolaĵon por ĉiu en la rondo.
Fabelojn ŝi rakontas, sen nur fariĝi laca,
kaj daŭre priatentas, ke l'domo estas paca.
Kuracas pupojn, estas eĉ dekoraciisto,
prizorgas la ĝardenon, kaj estas jen frizisto.
Nun tamen la presiston mi ne pli longe plagas,
ĉar multajn profesiojn ankoraŭ mi imagas
de inoj, kiujn kreis por l'ben' de l'homoj Dio.
Sed diras la pasporto: "Sen iu profesio".

*Traduko de la Germana poemo "Die Frau ohne Beruf" de N. N. 73 en la Germanan de JOACHIM GIESSNER (*1913-12-23 – †2003-11-25).*

Arg-939-1888 (2013-11-28 15:22:24)

Pri la tradukinto Joachim Gießner troviĝas informoj en la vikipedia paĝo http://eo.wikipedia.org/wiki/Joachim_Giessner.